Kontaktu la redakcion: ✉ kunfluo@proton.me + 31 6 19 46 48 37 aŭ @kunfluo

# Kunfluo

ĉiutaga informilo de Baltiaj Esperanto-Tagoj
BET-59 · Kaŭno, Litovio · 5–13 julio 2025

**n-ro 4** hodiaŭ: 25 °C morgaŭ: 20 °C mardo, la 8-a de julio 2025

## PROGRAMŜANĜOJ

· Prof. **Amri Wandel** havos unu plian prelegon pri astrofiziko, kiu okazos ĵaŭdon je la 12-a.
· Ĵaŭdon je la 15-a horo okazos prelego de **Başak Aray** pri la turka lingvoreformo.
· **Paola Tasato** prezentos kelkajn orientajn dancojn (ventro-dancon kaj indonezian dancon) tuj antaŭ la ĵaŭda koncerto de Kjara.
· La prelego de **Aida Čižikaitė** “Litovio dum jarcentoj” okazos ne en ĵaŭdo, sed sabaton.
· La spektaklo de de **Birutė Prekevičiūtė** *Litovio de Barbora* okazos ĵaŭdon je la 17-a.
· Ĉiuj prelegoj de prof. **Ilona Koutny** okazas en la Senata salono kaj komenciĝas je la 10-a.
Pro la ekskursa tago en merkredo, ĉi-numere ni publikigas ne nur la programon por hodiaŭ kaj morgaŭ, sed ankaŭ por ĵaŭdo – vidu p. 3.

## INFORMOJ

### Novaj aliĝintoj – nun 285

Dank’ al la surlokaj aliĝoj la nombro de aliĝintoj kreskis hieraŭ ĝis 285. Ni ne scias, ĉu temas pri definitiva nombro. Pri tio ni raportos en la lasta numero de *Kunfluo*, sabaton.

### Se vi eskursos morgaŭ, venu akurate je 9.30

La partoprenantoj de la tuttaga ekskurso al la regiono Vilkaviškis bv. veni morgaŭ akurate je 09.30. Ni renkontiĝu antaŭ la ĉefa enirpordo de la kongresejo.

## HODIAŬA PROGRAMO

| | **Mardo, la 8-a de julio** |
|---|---|
| **09.00 – 10.30** | Matenmanĝo (memstare) |
| **10.00 – 11.00** | Prelego de prof. Ilona Koutny: “Pri kio ni parolas kaj kiel? Ĝentileco internacie tra Esperanto” (*Senata salono*) |
| **11.00 – 12.00** | Prelego de prof. Mark Fettes: “Lingvo kaj tero” (*Senata salono*) |
| **11.00 – 13.00** | Ĉiunivelaj Esperanto-kursoj (*aŭditorioj: A1/A2 – 306, B1 – 406, B2 – 404, C1 – 405, paroliga – 212*) |
| **12.00 – 13.00** | Prelego de Gražina Opulskienė: “Zamenhof kaj Litovio” (*aŭditorio 403*) |
| **12.00 – 13.00** | Baza kurso de la litova lingvo. Gvidas Severija Marija Banaitytė (*aŭditorio 401*) |
| **13.00 – 14.30** | Komuna organizita tagmanĝo |
| **15.00 – 16.00** | Prelego de Tim Owen: “Simboloj de Esperantujo” (*aŭditorio 401*) |
| **15.00 – 16.00** | Prelego de István Ertl: “Spertoj de tradukisto – Kiel mi fariĝis maŝino” (*aŭditorio 212*) |
| **15.00 – 16.00** | Kantoateliero de Ĵomart kaj Nataŝa (*aŭditorio 306*) |
| **16.15 – 17.30** | Filmo de Aleksej Salomatov: *Somero de Sigrid* (*aŭditorio 401*) |
| **16.30 – 17.30** | Prelego de d-ro Gediminas Degėsys: “Nigra Afriko” (*aŭditorio 403*) |
| **16.30 – 17.30** | Prelego de Sakari Kauppinen: “Tove Jansson – la patrino de Mumintroloj” (*aŭditorio 306*) |
| **16.30 – 17.30** | Koncerto de Marina Moritz (*Teatra salono*) |
| **17.30 – 19.00** | Vespermanĝo (memstare) |
| **19.00 – 21.00** | Koncerto de JoMo (*Teatra salono*) |

## Lingva ludo de Mikaelo Lineckij *Komprenu min!*

Mi invitas dezirantojn publike kaj praktike montri sian lingvonivelon, partoprenante en la ludo *Komprenu min!* Por aktiva partopreno bezonatas du teamoj po 2–3 homoj. Nepraj kondiĉoj: libera posedo de la lingvo por scipovi rakonti pri certa nocio, ne nomante ĝin. Kutime oni ludas ĉi tiun ludon en nacia lingvo, sed en proponata variant oni ludos en la internacia lingvo! Pro tio estas permesata uzado de la vortaro. Tempo por prezenti ĉiun nocion estas strikte limigita. Certe estas bezonataj ankaŭ spektantoj-aplaŭdantoj, kiuj plezure spektos interbatalon de la rivalaj teamoj. Laŭeble rapide anoncu vian partoprenon ĉe Mikaelo Lineckij (iniciatinto kaj produktanto de la ludo) kaj ni ludu ĉiuvespere antaŭ la vesperaj kulturaj programeroj. Teamo, kiu gajnos en la granda finalo, ricevos specialan premion!

**Mikaelo Lineckij**

Ĉu vi havas belan foton el BET? Raporton pri kunveno? Aŭ eble ion interesan por rakonti? Ne hezitu sendi vian kontribuaĵon! **@kunfluo**

INFORMOJ

## Pliaj raportoj pri BET en la litovaj amaskomunikiloj

Hieraŭ *Kunfluo* informis pri litovaj amaskomunikiloj, kiuj raportis pri BET-59. Al la listo de la artikoloj pri BET-59 daŭre aldoniĝas novaj. Inter ili ekzemple la novaĵretejo *Alkas.lt*. Ampleksa artikolo aperis ankaŭ en la retejo de ĵurnalistoj de Kaŭno. Ni scivole atendas pliajn raportojn.

**La libroservo** funkcias ĉiutage 10.00 – 12.30 kaj 14.00 – 18.00 en la aŭditorio 107




## Originala dokumenta filmo

La filmo rakontas kiel 8-jaraĝa knabino Sigrid, kiu vivas kun siaj gepatroj en Alandaj Insuloj de Finnlando, pasigas sian someron. Ŝi banas sin en la maro, renkontas kaj ĉirkaŭbrakas konatajn kaj nekonatajn katojn en la areo, ĉeestas subĉielajn koncertojn de populara muziko. Poste kun sia patrino ŝi vojaĝas al Svedio, kie ŝi partoprenas la internacian kurson de Esperanto-kulturo. La knabino facile komunikiĝas kun homoj el multaj landoj, inkluzive de Danio, Svedio, Belgio, Germanio, Pollando, Rusio, Kazaĥio kaj Sirio. Aŭskultante prelegojn, koncertojn kaj diskutojn pri vivo en diversaj landoj, kaj kantante kantojn, ŝia mondo multe vastiĝas. Ankaŭ en la filmo geedza paro, festanta 27 jarojn da geedzeco, rakontas la historion de sia amo. Kiam ili renkontiĝis dum Esperanto-aranĝo, Eddy vivis en Belgio, kaj Ella en Pollando... En la filmo muzikas Ĵomart kaj Nataŝa, kaj Kimo.
**La filmo *Somero de Sigrid* estos prezentita hodiaŭ je 16.15 en aŭditorio 401. Pliaj filmoj de Aleksej Salomatov – en la venontaj tagoj.**



Renkontiĝo ĉe la kunfluejo de la riveroj Neris kaj Nemunas. Al tiu loko ŝuldiĝas la nomo de nia gazeto.



fotis **Nina Pietuchowska**


Gražina Opulskienė rakontas pri Esperanto al hazardaj preterpasantoj, kiuj aŭdis la E-grupon.

# Novaj libroj el Malagasio

Kadre de sia prelego pri Esperanto en Afriko (vendredon je la 15-a), Ulrich Matthias prezentos ankaŭ du ĵus aperintajn libretojn de la malagasa esperantistino Ranja Zafinifotsy. Temas pri la infanlibro *Semoj de amikeco* (48 p. A5) kaj la Esperanto-lernilo *La vojaĝo de Ando* (60 p. A6). Ambaŭ libretoj estas belege ilustritaj per AI. Ili jam nun haveblas je malaltaj prezoj (2,50 € kaj 2,00 €) en la libroservo de BET.

**Ulrich Matthias**




## MORGAŬA PROGRAMO

| | **Merkredo, la 9-a de julio** |
|---|---|
| **09.00 – 10.30** | Matenmanĝo (memstare) |
| **09.30 – 18.00** | Tuttaga ekskurso |
| **13.00 – 14.30** | Tagmanĝo (dum ekskursoj aŭ en la urbo por restintoj en la BET-ejo) |
| **17.30 – 19.00** | Vespermanĝo (memstare) |
| **19.00 – 20.00** | Koncerto de Lucio Avitabile (*Granda salono*) |
| **20.00 – 21.00** | Koncerto de Ĵomart kaj Nataŝa (*Granda salono*) |

## ĴAŬDA PROGRAMO

| | **Ĵaŭdo, la 10-a de julio** |
|---|---|
| **09.00 – 10.30** | Matenmanĝo (memstare) |
| **10.00 – 11.00** | Prelego de prof. Ilona Koutny: “Kolora lingva bildo de la mondo” (*Senata salono*) |
| **11.00 – 12.00** | Prelego de prof. Mark Fettes: “La konsoloj de lingvo-amanto” (*Senata salono*) |
| **11.00 – 12.00** | Prelego de Arno Lagrange: “Stefan Zweig – eŭropa verkisto” (*aŭditorio 403*) |
| **11.00 – 13.00** | Ĉiunivelaj Esperanto-kursoj (*aŭditorioj: A1/A2 – 306, B1 – 406, B2 – 404, C1 – 405, paroliga – 212*) |
| **12.00 – 13.00** | Baza kurso de la litova lingvo. Gvidas Severija Marija Banaitytė (*aŭditorio 401*) |
| **12.00 – 13.00** | Tria prelego de prof. Amri Wandel pri astrofiziko (*Senata salono*) |
| **13.00 – 14.30** | Komuna organizita tagmanĝo |
| **15.00 – 16.00** | Prelego de prof. Laura Brazzabeni: “Instruado de Esperanto en sinkronaj kaj nesinkronaj kursoj” (*aŭditorio 306*) |
| **15.00 – 16.00** | Prelego de Ulrich Matthias: “Esperanto kaj anima frateco” (*aŭditorio 404*) |
| **15.00 – 16.00** | Prelego de Başak Aray: “La turka lingvoreformo” (*aŭditorio 403*) |
| **15.00 – 16.30** | Filmo de Aleksej Salomatov: *Verda Saliko* (*aŭditorio 401*) |
| **16.30 – 17.30** | Prelego de Ed Robertson: “Nerespondditaj demandoj” (*aŭditorio 405*) |
| **16.30 – 17.00** | Spektaklo de Mario Migliucci: *Doktoro Esperanto* (*Teatra salono*) |
| **17.00 – 17.30** | Spektaklo de Birutė Prekevičiūtė *Litovio de Barbora* (*Teatra salono*) |
| **17.30 – 19.00** | Vespermanĝo (memstare) |
| **18.30 – 19.00** | Prezento de Paola Tosato: Orientaj dancoj (*Granda salono*) |
| **19.00 – 21.00** | Koncerto de Kjara (*Granda salono*) |

# Itala kontribuo al BET

Ĉi-jare la itala ĉeesto en BET estas aparte riĉa je eventoj. Ni ĝojas prezenti du talentajn italajn artistojn, kiuj riĉigos la kulturan programon de BET:

– **Lucio Avitabile**: lia nova KD, ĵus eldonita, estos prezentita dum la morgaŭa koncerto. Bona okazo malkovri liajn novajn kreaĵojn!

– **Chiara Raggi**: la sekvan tagon estos la vico de Kjara, kiu ĝojigos nin per sia prezentado. Krome, okazos ankaŭ prezento de la teatraĵo *Doktoro Esperanto* de **Mario Migliucci**.

Aldone al la spektakloj, mi persone partoprenos en la programo per du prelegoj, kiel planite, kiuj okazos ĵaŭde kaj vendrede. La temoj, kiujn mi traktos, estas tre aktualaj por la disvastigo de Esperanto:

– Sinkronaj kaj nesinkronaj kursoj.

– Esperanto kaj radio kun EsperRadio: profunda analizo de la rolo de radio en la disvastigo de Esperanto, kun fokuso sur la projekto EsperRadio de kiu mi estas parto kaj kie vi trovos raportojn pri mia partopreno.

Ni ankaŭ fieras vidi la partoprenon de pluraj italoj en ĉi tiu evento, multaj el ili danke al Erasmus-projektoj antaŭenigataj de Itala Instituto de Esperanto kaj BEA (Bunta Esperanto-Asocio). Ĉi tiu sinergio inter institucioj kaj internaciaj projektoj estas esenca por plifortigi ligojn kaj antaŭenigi kunlaboron ene de la tutmonda Esperanto-komunumo.

Mi deziras al ĉiuj bonan kaj fruktodonan renkontiĝon, plenan je kulturaj interŝanĝoj, novaj amikecoj kaj reciproka riĉiĝo. Ĉi tiuj Baltiaj Esperanto-Tagoj estu plia atesto pri la vigleco kaj unueco de la internacia Esperanta movado.

**Laura Brazzabeni**
Prezidanto de Itala Esperanto-Federacio

## FINANCA SUBTENANTO DE BET-59

iniciatyvos KAUNUI

## FOTOJ DE LA TAGO

fotis **Gražvydas Jurgelevičius**




Necesas kontroli la lastajn programŝanĝojn en *Kunfluo*.



Arno Lagrange en la spektaklo *La Ŝaknovelo*.



Hieraŭ vespere koncertis la Esperanta dueto SuMi.

**KUNFLUO** estas ĉiutaga informilo de BET-59. Redaktoro: Paweł Fischer-Kotowski, ✉ **kunfluo@proton.me**
Kontaktu la redakcion ankaŭ per SMS aŭ unu el la poŝtelefonaj aplikaĵoj: WhatsApp, Telegram aŭ Signal:

✆ **+31 6 19 46 48 37** aŭ **@kunfluo**

en Signal: @kunfluo.2025